

17

La Testamento De La Apaĉo

Kiam mi alvenis tie, neniu homo videblis. Kie la tri estis? Ĉu ili estis kaŝiĝintaj en la arbedaroj, pro kaŝe vidi, kion mi alportis? Aŭ ĉu ili kune estis foririntaj pro ĉasi? Mi vokis, kaj ne ricevis respondon.

Ho, se ili fakte forestus! Sed mi devis esti gardiĝe, kaj traserĉis per ĉiu hasto la ĉirkaŭon de la loko. Certiĝis al mi, ke ili vere estis foririntaj. Nun rapide ek al la laboro!

Mi elzonigis la tranĉilon kaj eltranĉis ekzakte je la okzidenta flanko de la ĉefa tombo, dense al ĝia rando, pecon de herbejo, pro poste reenmeti ĝin tiel, ke nenio plu estis videble de mia fosado. Do ne terpecoj kuŝu ĉirkaŭe. Tial mi vastigis kovrotukon flanke de mi kaj metis la teron, kiun mi elfosis, zorge sur ĝin, pro poste replenigi la truon per tio.

Nun mi laboris per febreca rapideco, ĉar ĉiu momento povis revenigi la tri. Dum tio mi aŭskultis tempon post tempo, ĉu iliaj paŝoj aŭ voĉoj aŭdeblis. Per la ekscito, en kiu mi estis, kaj kiun mi ne kapablis regi tute, estis certe facile pensebla, ke miaj oreloj ne havis la kutiman aŭdardecon.

La truo ĉiam pli grandiĝis, jam estis preskaŭ metron profunde. Tiam mia tranĉilo trafis ŝtonon. Mi forigis ĝin kaj poste ankaŭ duan, kiu estis sub tiu, kaj nun vidis malgrandan, kvarangulan, ankoraŭ tute sekan spacaĵon antaŭ mi, kies muroj estis formigitaj el glataj ŝtonoj. Sur la bazo estis dika, kunfaldita ledaĵo — la testamento de mia amiko kaj frato Winnetou. En la neksta momento ĝi estis en mia poŝo, kaj mi hastis replenigi la truon per tero.

Tio unue okazis rapide. Mi surŝutis la teron de la kovrotuko iom post iom, firmbatis ĝin per la pugno, kaj fine metis la eltranĉitan herbejaĵon sur ĝin. Neniu homo nun povis vidi, ke tie ĉi estis fosita truo.

Dank' al Dio! Tio estis sukcesita — almenaŭ mi pensis tiel. Eĉ ne la plej mallaŭta brueto estis aŭdebla, kaj mi do havis tempon malfermi la ledaĵon. Estis faldita kiel letera koverto, kun la pintoj unu flanke de la alia. En tiu troviĝis dua, kies turnitajn angulojn Winnetou estis kunkudritaj per cervaj tendenoj. Mi distranĉis ilin, kaj nun atingis la testamenton, kiu konsistis el pluraj, dense per inko surskribitaj paperfolioj.

Ĉu mi kaŝu ĝin, aŭ ĉu mi rajtis legi ĝin ĵus nun? Tion mi demandis min. Kial kaŝi ĝin? Ja ne estis kaŭzo pro tio. Kiam miaj tri kunuloj revenis kaj vidis min legante, kion oni volis kontraŭi pri tio? Ĉu ili sciis, kio ĝi estis? Letero aŭ ajn io alia, kion mi delonge portis kun mi. Ili eĉ ne havis la rajton demandi pri la paperoj. Kaj se ili farus tion, mi povis respondi ajn kiel mi volis. Dum tio vere urĝis min ekscii, kion Winnetou estis skribita. Klekih-petra, kiel pri multaj aliaj, estis estinta lia instruisto ankaŭ pri tiu lerto. Sed la apaĉo certe ne estis havinta multan tempon praktiki ĝin.

Intertempe li estis skribinta komenton en mian notlibron. Mi do konis lian skribon. Ĝi ne estis bele, ne perfekte, sed fortikece. Ĝi similis al tiu de kvardekjara lerneja knabo, kiu estis klopodinta skribi bele.

Mi ne povis ellasi ĝin, sidiĝis kaj disturnis la foliojn. Jes, tiu estis la skribo de Winnetou, ĉiu litero precize en la sama vasteco kaj pozicio, ne kiel skribite, sed kiel per pasio desegnite kaj pentrite! Kie li do verkis tiujn multajn liniojn, kaj kiel longe li nu estis bezoninta pro tio? Miaj okuloj grandiĝis, ili pleniĝis per larmoj. Mi haste sekviŝis ilin kaj legis:

„Mia kara, bona frato!

Ci vivas, kaj Winnetou, kiu amas cin, estas morta. Sed lia animo restas ĉe ci. Ci tenas ĝin en cia mano, ĉar ĝi parolas al ci el ĉi tiuj folioj. Lasu ilin resti sur cia koro!

Ci eksciu la lastan deziron de cia ruĝa frato, kaj legu multajn vortojn de li, kiujn ci neniam forgesos. Sed unue li diros al ci, kio estas plej necese. Ci vidos tre multan oron, kaj faros kun ĝi, kion cia menso diros al ci. Ĝi kuŝis kaŝite en la Nugget-tsil, sed Santer, la murdisto, deziregis ĝin. Tial Winnetou forportis ĝin al la Dekil-to, kie ci iam estis estinta kun li. Eksciu la lokon, kie ĝi troviĝas! Ci rajdu supren laŭ la Indeltŝe-tŝil ĝis al la Tse-ŝoŝ ĉe la falanta akvo. Tie ci deĉevaliĝu kaj grimpu — —“

Ĝis tie mi estis leginta, kiam mi ekaŭdis voĉon malantaŭ mi:

„Good day, Mr. Shatterhand! Vi do provas literumi, ĉu?“

Mi turniĝis reen kaj vidis, ke mi antaŭe estis farinta la plej egan stultaĵon aŭ neglektaĵon de mia vivo. Mi estis metinta dek paŝojn malantaŭ mi kaj la *turkey*-ojn kaj ankaŭ la pafilojn. Mi sidis apogante al la tombo, do kun la dorso al la vojo, kiu kondukis el la valo supren. Pri tiu nepardonebla neatento kulpis la fervoro pri la lasta volo de Winnetou. Tiel mi ne estis povinta vidi, ke tiu, kiu nun parolis al mi, estis kaŝirante malantaŭ mi al la pafiloj, kiujn mi nun ne plu povis atingi, ĉar li staris tie kaj celis per sia propra pafilo al mi. Per unu salto mi ekstarigis, ĉar tiu viro estis neniu alia sed — Santer!

En la neksta momento ambaŭ miaj manoj estis ĉe — nu, kie? Ĉu ĉe la zono, pro eltiri la revolverojn? Tion mi volis, sed kiam mi estis genuinta antaŭe sur la tero pro fosi la truon, la zono kun la aĵoj, kiuj estis en ĝi, ĝenis kaj premis min, kaj mi estis estinta tiel sengardiĝe per la sento de la ŝajna sekureco demeti ĝin. Nun ĝi kuŝis tie transe sur la

tero, kaj en ĝi ankaŭ la tranĉilo. Mi do nuntempe estis sen ĉiu armilo; Santer vidis la vanan movon de miaj manoj, moke ekridis kaj minacis:

„Neniun paŝon de la loko, kaj neniun etendon al la armiloj, alikaze mi tuj pafos! Estas mia ĝissanga seriozeco!“

La okuloj de Santer dum tio brilis al mi en maniero, kiu diris al mi, ke mi tiukaze fakte ricevus kuglon el la al mi direktita tubo. Lia subita ekapero estis tute surpriziginta min, sed nun mi reregis min. Mi staris senmove kaj malvarmsange vidis en lian vizaĝon.

„Nun finfine Vi estas sub mia forto!“ li pluis. „Ĉu Vi jen vidas mian fingron sur la lanĉilon? Unu softa puŝeto, kaj mi krakos kuglon en Vian cerbon, fidu pri tio! Do ne movigu unu membron, alikaze mi sendos Vin al la diablo! Pri Vi oni atentigu. Vi ja ne ekspektis min, ĉu, ha?“

„Ne jam“, mi respondis trankvile.

„Jes, Vi kalkulis, ke mi povus veni nur morgaŭ vespere. Tiu kalkulado sed estis malĝusta.“

Tion la fiulo sciis, do li jam estis interparolinta kun miaj kunuloj. Kie ili estis? Ke ili estus troviĝintaj kune tie ĉi estus maltrankviliginta min, se mi ne jam estus estinta tiel trankvile. Ili ja povis esti ajn kiu, kio aŭ kiel ili volis, sed ili ne estis murdistoj, kaj tial mi ne devis timi esti mortigata de Santer dum ilia ĉeesto, se mi nur ne nun provokis lin. Mi do tenis mian senmovan pozicion, dum li pluparolis per la esprimo de nepacigebla malamo.

„Mi volis iri al la Salt Fork de la Red River, pro diri al Tangua, ke la apaĉo, la hundo, finfine mortaĉis, sed hazarde trovis aron da kajovajoj kaj tial nun ĉeestas iom pli frue. Malsupre mi renkontis Gates:on kaj aŭdis de li, ke li estis kunveniginta unu *Mr. Jones*:on. Mi eksciis, ke tiu Jones havis du pafilojn, grandan kaj malgrandan. Tio vekis mian suspekton. Tial mi lasis priskribi tiun viron al mi detale, kaj tiam sciis, kion mi devis pensi. Li ja ŝajniĝis stulte, ankaŭ nur surhavis ordinaran bluan tolvestaĵon, sed ne povis esti iu alia, sed Old Shatterhand. Tial mi suprengrimpis pro kaŝiĝi kaj kapti lin je lia reveno de la ĉasado, sed li jam tieis. Vi fosis truon, kaj ni rigardis Vin. Nu diru, kian paperon Vi tenas tie en Via mano!“

„Tajloristan fakturon.“

„Aŭskultu, do ne pensu, ke Vi povas mistifiki min! Kio ĝi estas?“

„Tajlorista fakturo. Alvenu, kaj vidu al ĝi!“

„Tion mi lasos. Mi unue havu lin pli fikse. Kion Vi entute nun faras tie ĉi ĉe la Mugwort Hills, kiujn la apaĉoj nomis Nugget-tsil?“

„Trezorserĉado.“

„Ho, mi antaŭsciis tion!“

„Sed mi nur trovas tajloristajn fakturojn.“

„Mi rigardos ĝin detale. La diablo ja metas Vin ĉien, kie Vi ne estu. Tiun fojon li agis ruze la unuan fojon. Tio estos Via fino!“

„Aŭ Via, ĉar unu el ni certe devos ekmorti, tio certas.“

„Aŭdeca fihundo!“ li siblis. „Fakte, tiu ĉi hundo eĉ graŭlas dum la ekmortado! Sed la senpotenca dentklakado ne savos Vin. Kaj la orajn ostojn, kiujn Vi volis elterigi tie

ĉi, ni prenos por ni mem!“

„Trankvile prenu ilin, kaj elrompu Viajn dentojn per ili!“

„Ne mokadu! Vi ja diris, ke ne multo da la oro ankoraŭ ĉi tieas, sed la papero en Via mano certe donos informon al ni.“

„Do venu kaj prenu ĝin!“

„Jes, mi ricevos ĝin, tion mi ĵus pruvos al Vi. Nur atentu, kion mi diras al Vi! Post la plej eta nepermesita movo, kaj post la plej eta rifuzo obei al mi, mi lanĉos. Al alia mi eble nur minacos. Sed Vi estas tiel danĝera fiulo, ke mi necese seriozu.“

„Tion mi ja mem scias tute bone.“

„Bone, ke Vi konfesas tion. Do venu, kaj katenu lin!“

Tiuj vortoj estis parolintaj al la flanko. Tie Gates, Clay kaj Summer estis kaŝiĝintaj malantaŭ la arboj. Ili nun elpaŝis kaj malrapide venis al mi. Gates provis senkulpiĝi, dum li tiris rimenon el la poŝo.

„*Sir*, je nia miro ni aŭdis, ke Vi estas Old Shatterhand. Kial Vi mensogis al ni? Vi volis trompi nin, kaj nun ni fiksligu Vin. Do ne defendiĝu! Tio ne helpas al Vi, ĉar *Mr. Santer* tuj pafos, Vi povas fidi pri tio!“

„Neniujn nenecesajn paroladojn!“ Santer vokis. Kaj al mi li ordonis: „Faligu la paperon, kaj etendu Viajn brakojn por li!“

Li estis konvinkita havi min tutcerte, sed mi nun sciis, ke li estos sub mia forto, ne mi sub lia. Gravis nur utiligi la situacion rapide kaj forte.

„Nu, rapidiĝu, aŭ mi pafos!“ Santer minacis al mi. „Forĵetu la paperon!“

Mi lasis ĝin fali.

„Etendu la manojn!“ li ordonis plu.

Ŝajne obeante mi tendis la manojn al Gates, sed tiel, kiam li volis kunligi ilin, devis stariĝi inter mi kaj Santer.

„For de tie, for! Vi ja staras rekte antaŭ la pafila celo!“ Santer vokis al li. „Kiam mi devas —“

Li ne povis paroli plu, ĉar li estis interrompata per tre malsofta maniero. Anstataŭ lasi min kateni, mi ekprenis Gates-on je la korpo, levis lin alten kaj ĵetis lin al Santer, kiu ja volis salti flanken, sed tro tarde. Li estis ŝirata teren, kaj la pafilo falis el liaj manoj. Subite mi tieis kaj genuiĝis sur li. Pugnobato senkonsciigis lin mallongan tempon. Tiam mi stariĝis same rapide kaj tondrumis al la kunuloj de Santer:

„Jen la pruvo, ke mi vere estas Old Shatterhand! Vi volis fitrakti min! Tuj forigu Viajn armilojn, aŭ mi pafos! Faligu ilin! Ankaŭ mi seriozas!“

Mi estis ŝirinta revolveron el la zono de Santer kaj direktigis ĝin al la tri ,veraj okzidentuloj’, kiuj ankaŭ tuj obeis.

„Sidiĝu, tie ĉe la tombo de la ĉefa filino — rapide, rapide!“

Ili iris kaj sidiĝis. Mi estis ordoninta ilin al ĵus tiu loko, ĉar tie neniu armilo estis proksime al ili.

„Nun restu sidante trankvile!“ mi pluis. „Nenio okazu al Vi, ĉar Vi estis trompitaj. Sed fuĝoprovo aŭ ekdefendo tuj kostos Viajn vivojn!“

„Tio ja estas terure, tute horore!“ Gates plendis, frotante siajn membrojn. „Ĵus estis,

kvazaŭ pilko flugus tra la aero. Mi pensas, ke diversaj el miaj ostoj disrompiĝis!“

„Estas Via propra kulpo. Zorgu, ke ne estiĝos eĉ pli aĉe! Die kie Vi havis la rimenojn?“

„De *Mr. Santer*.“

„Ĉu Vi havas pli?“

„*Yes*.“

„Donu ilin!“

Gates tiris ilin el la poŝo kaj donis ilin al mi. Per tiuj mi kunligis la piedojn de Santer kaj fiksigeis liajn manojn sur la dorso.

„Nu, tiu kuŝas bone“, mi ridis malice. „Ĉu mi katenu ankaŭ Vin?“

„Ne, dankon, *Sir!* Tute sufiĉas al mi. Mi kondutos tie ĉi tute trankvile, ajn kiel longe plaĉos al Vi.“

„Tiel Vi agas tre bone, ĉar kiel Vi povas vidi, mi ne ŝercas.“

„Entute dankon pro Viaj ŝercoj! Kaj ni pensis, ke Vi nur estis kaptilisto!“

„Tiu eraro ne estis Via plej granda, ĉar pro esti deca okcidentulo necesas pli, ol Vi ŝajnas antaŭenti. Kio pri Via ĉasado? Ĉu Vi pafis ion?“

„Tute nenion!“

„Jen vidu al la du birdinoj! Tiujn mi alportis. Se Vi kondutos obeeme, Vi rajtos poste friti kaj kunmanĝi ilin. Esperende Vi baldaŭ komprenos, ke Vi pritaksis tiun Santer:on tute malĝuste. Ne estas iu fiulo pli malica sub la suno ol li. Vi tuj aŭdos tion, ĉar mi vidas, ke li rekonsciigis.“

Santer moviĝis, li rekonsciigis kaj malfermis la okulojn. Li vidis, ke mi staris antaŭ li kaj surmetis mian zonon. Li ankaŭ vidis siajn tri kunulojn, kiuj sidis senarmile ĉe la tombo de la indianino, kaj ektimigite vokis:

„Kio estas tio? Mi — mi — estas katenita!“

„Jes, Vi estas katenita“, mi kapjesis. „La situacio per tute simpla maniero estiĝis alia. Mi esperas, ke Vi ne kontraŭas pri tio.“

„Hundo!“ li grumblis kolere.

Tiam li explore vidis transe al siaj kunuloj kaj vokis al ili:

„Ĉu Vi do elparolaĉis ĉion?“

„Ne“, Gates asertis.

„Tion mi ankaŭ ne estus konsilanta al Vi!“

„Kio estas? Pri kiu ili ne parolaĉu?“ mi demandis akre, atentigite per la vortoj de Santer.

„Nenion!“

„Ho ho! Ekparolu, aŭ mi malfermos Vian buŝon perforte! Ĉu do?“

„Estas pro la oro“, li respondis ŝajne devigite.

„Kial pro la oro?“

„Pro la verŝajna kaŝejo. Mi parolis al ili pri ĝi, kaj mi pensis, ke ili elparolaĉis ĝin.“

„Ĉu tio veras?“ mi demandis Gates:on.

„Jes“, estis lia respondo.

„Ĉu Santer vere ne parolis pri io alia?“

„Ne.“

„Estu sincere! Mi atentigas Vin, ke Vi faros per eventualaj mensogoj aŭ perfidoj ne damaĝon al mi, sed al Vi mem.“

Gates hezitis kelkajn momentojn, kaj tiam asertis:

„Vi povas kredi ĝin de mi, *Sir*. Ne estas mensogo. *Mr.* Santer parolis nur pri la oro.“

„Mi tamen ne kredas ĝin. Via senkulpa konduto ne veras, kaj en Via vizaĝo estas insidemo. Sed Vi ne sukcesos ion per tio. Mi denove postulas al Vi diri al mi la veron, *Mr.* Gates. Ĉu Santer parolis al Vi pri la kajovajoj, kiam li renkontis Vin malsupre en la valo?“

„Jes.“

„Ĉu li estis sole?“

„Jes.“

„Ĉu li vere renkontis la ruĝulojn?“

„Jes.“

„Kaj tial ne estis estinta ĉe la Salt Fork, ĉu?“

„Li ne estis tie.“

„Ĉu estis granda aro, kiun li renkontis?“

„Sesdek militistoj.“

„Kiu estris ilin?“

„Pida, la filo de la ĉefo Tangua.“

„Kie ili estas nun?“

„Ili iris hejmen, en ilian vilaĝon.“

„Ĉu tio ankaŭ fakte veras?“

„Estas tiel, kiel mi diras, *Sir!*“

„Tute laŭ Via volo, *Mr.* Gates. La volo de la homo estas lia ĉiela regno, sed ankaŭ ofte lia infero. Kiam Vi mensogas al mi, Vi tutcerte pentos ĝin poste. Rilate al la oro, Via rajdado ĝis nun tute vanis. Vi ne trovos ĝin, ĝi ne estas plu tie ĉi.“

Mi prenis la testamenton de Winnetou, kiu ankoraŭ kuŝis sur la tero, metis ĝin en la du ledkuvertojn kaj enpoŝigis ĝin.

„Ŝajnas, ke *Mr.* Santer tamen scias tion pli bone ol Vi“, Gates kontraŭis.

„Li scias tute nenion“, mi deklaris koncize.

„Ĉu Vi do scias, kie estas la oro?“

„Eble.“

„Do diru ĝin al ni!“

„Mi ne rajtas.“

„Jen la pruvo, *Sir!*“ Gates ĉagrenite ekkoleriĝis. „Vi ne atentigas pro nia avantaĝo. Vi ne estas sindonema kamarado.“

„La oro ne estas Via posedaĵo.“

„Sed ĝi povus esti nia posedaĵo, ĉar *Mr.* Santer volas trovi ĝin kune kun ni, kaj partigi ĝin inter ni.“

„Ĉu li, kiu nun estas mia kaptito?“

„Kion Vi povas fari al li? *Mr.* Santer rehavos sian liberecon.“

„Malfacile. Pli verŝajne li devos pagi siajn agojn per la vivo.“

Santer aŭdigis mokan ridadon. Tial mi turniĝis al li.

„Pli poste Vi ne plu fartos tiel rideme kiel nun. Kion mi nun faros kun Vi, laŭ Via opinio?“

„Nenion“, li rikanis al mi.

„Kiu malhelpu al mi pafi kuglon en Vian kapon?“

„Vi mem. Oni ja scias, ke Old Shatterhand timas mortigi homon.“

„Fakte mi ne estas la viro, kiu facilanime mortigas homon. Sed Vi meritas la morton multoble. Ankoraŭ antaŭ malmultaj semajnoj mi senkondiĉe estus mortpafinta Vin, se mi estus rekontinta Vin. Sed Winnetou mortas, mortiĝis kiel kristano. Kun li, ankaŭ mia venĝo estu enterigata.“

„Ne faru tiel bonajn paroladojn! Old Shatterhand ne riskas murdon. Vi ne kapablas, kion Vi volas, tio estas ĉio!“

Tio estis impertinentaĵo. Mi povis ĝin nur klarigi al mi per lia obstinemo, ĉar mi ne sciis, kion sciis li. Tial mi diris trankvile:

„Nur insultu min! Homo de Via speco ne povas kolerigi min. Mi fakte diris, ke mia venĝemo estu enterigita kune kun Winnetou, sed estas diferenco inter venĝo kaj puno. La kristaneco ja ne konas venĝon, sed ĝi postulas la punon de ĉiu kulpo. Ĉiun krimaĵon sekvu la pentofaro. Mi do ne venĝiĝos pri Vi, sed tamen Vi ne estu permesata eviti Vian punon.“

„*Pshaw!* Nomu ĝin puno aŭ venĝo, estas tute la samo! Ridige! Vi ne volas venĝiĝi, sed Vi volas puni min, verŝajne murdi min. Murdo estas murdo. Ne fanfaronadu per Via kristaneco!“

Mi ankaŭ nun ne lasis provoki min, sed restis objektive.

„Vi eraras. Ja ne ekideos al mi fitrakti Vian vivon. Mi transportos Vin en la plej proksiman fortikaĵon, kaj tie donos Vin sub la forton de la tiea juĝisto.“

„Ha, ĉu tio estas Via intenco?“

„Certe.“

„Kion Vi nu volas fari tion, *Sir?*“

„Tio estas mia afero!“

„Certe ankaŭ mia, ĉar mi pensas, ke mi ankaŭ ĉeestu. Verŝajne estos male, fakte tiel, ke mi fortransportos Vin. Kaj ĉar mi ne estas tiel pia kristano, kiel Vi, ne ekideos al mi rezigni pri mia venĝo. Entute ĝi jam estas tie ĉi, jam tie ĉi! Vidu, kiel ĝi venas!“

Santer kriis tiujn vortojn ĝojege, kaj lia ĝojkrio ne estis senkaŭze, ĉar ĝi eĉ estis subsonigita de kriado, kiu eksonis ĵus en tiu momento ĉie ĉirkaŭ ni, kaj je la sama tempo ekaperis dekstre kaj maldekstre, antaŭe kaj malantaŭe multnombraj ruĝaj figuroj, ŝminkitaj en la militaj koloroj de la kajovajoj, kiuj serpentece rapide alkuris kaj embuskiĝis min en ilia mezo.

Gates estis mensoginta al mi. Santer estis kunveniginta la kajovajojn al la Nuggettsil. Ili estis, kiam ili estis aŭdintaj la mesaĝon pri la morto de Winnetou, tuj decidintaj fari la feston de tiu bonvena okaziĝo ĵus tie, kie kuŝis enteriĝite lia patro kaj lia fratino. Tio estis tiel tipe indianece, kaj konvenis tiel ekzakte al la pensmaniero de la murdisto, al kiu eĉ pli poste okazu la bonŝanco igi min, la amikon de Winntou, sub sian forton tie ĉi en la Mugwort Hills.

La atako, eĉ okaziginte tiel subite, tute ne ekmaltrankviligis min. En la unua momento mi estis estinta preta defendiĝi, kaj elzonigis la revolverojn; sed kiam mi vidis min embuskite de sesdek militistoj, mi remetis la armilojn en la zonan. Fuĝo estis neeble, kaj defendiĝo tute vane. Ĉi ĉio maksimume nur povis malbonigi mian situacion. Mi nur reenpuŝis la kontraŭulojn, kiuj staris plej proksime al mi kaj etendis iliajn manojn al mi, kaj mi deklaris per laŭta voĉo:

„Old Shatterhand igas sin sub la forton de la militistoj de la kajovajoj. Ĉu ilia juna ĉefo Pida ĉi tieas? Al li, kaj nur al li mi eldoniĝos libervole.“

La ruĝuloj ĉesis ataki min kaj turniĝis al Pida, kiu ne estis partopreninta dum la atako, sed staris atendente sub la plej proksimaj arboj.

„Ĉu libervole?“ mokis Santer, kiun liaj helpantoj estis liberigintaj intertempe. „Tiu ulo, kiu lasas sin nomi tiel fanfarone Old Shatterhand, ankoraŭ parolas pri libera volo! Ridige! Li kapitulacu, alikaze li estos batata teren. Ataku lin!“

Sed li tree evitis ataki min mem. La kajovajoj kontraŭe obeis al lia voko kaj reatakis min, sed ne per la armiloj, sed per la nuraj manoj, ĉar ili volis kapti min vive. Mi ankaŭ defendiĝis laŭforte kontraŭ ili, kaj terenbatis plurajn el ili, sed certe ne estus daŭre persistinta al la granda superforto, kaj batinta teren, se Pida ne estus ordoninta:

„Ĉesu, lasu Old Shatterhand:on! Li volas sin doni sub mian forton!“

Ili cedis for de mi. Santer kolere vokis:

„Kial li estu indulgata? Li ricevu tiom da batoj kaj bategoj, kiom tieas brakoj kaj pugnoj. Ĉiam ek! Mi ordonas ĝin!“

Tuj la juna ĉefo paŝis al li.

„Vi volas ordoni tie ĉi, ĉu? Ĉu vi do ne scias, kiu estas la estro de tiuj militistoj?“

„Estas vi.“

„Kaj kio estas vi?“

„La amiko de la kajovajoj, kies volo ja esperinde valoras iom!“

„Ĉu amiko? Kiu diris tion al vi?“

„Via patro.“

„Tio ne veras. Tangua, la ĉefo de la kajovajoj neniam uzis la vorton amiko pri vi. Vi estas nenio pli ol palvizaĝo, kiu estas tolerata inter ni.“

Ŝate mi estus uzinta la mallongan tempon de tiu interparolo pro subite trabati min kaj forkuregi. Eble mi eĉ estus sukcesinta tion, ĉar la ruĝuloj direktigis ilian atenton plie al Santer kaj Pida ol al mi, sed dum tio mi estus devinta tielasi miajn pafilojn, kaj tion mi ne volis. Nun Pida venis al mi kaj diris:

„Old Shatterhand volas esti mia kaptito. Ĉu li libervole eldonos ĉion, kion li kunhavas?“

„Jes“, mi respondis.

„Kaj li lasos sin kateni, ĉu?“

„Jes.“

„Do donu viajn armilojn al mi!“

Interne estis kontentiĝo, ke Pida demandis min tiamaniere, ĉar tio estis signo, ke li pritaksis min ĝuste kiel kontraŭulo. Mi donis al li la revolverojn kaj la tranĉilon. Santer

prenis la Henry-pafilon kaj la ursmortigilon de la tero. Pida vidis tion kaj demandis lin:

„Per kiu rajto vi fituŝas tiujn pafilojn? Remetu ilin sur la teron!“

„Ne ekideos al mi! Ili estas miaj.“

„Ili estis la posedaĵoj de Old Shatterhand, kiu eldoniĝis al mi. Do ili estiĝis miaj posedaĵoj kun li!“

„Kaj al kiu vi ŝuldas, ke vi povis kapti lin? Nur al mi. Li jam estis sub mia forto. Li estas mia, kaj kune kun li ĉio, kion li posedas. Mi rezignos nek pri li, nek pri la fama Henry-pafilo.“

Pida minacante levis la manon kaj ordonis refoje:

„Remetu ilin, tuj!“

„Ne!“

„Forprenu ilin de li!“ la juna ĉefo ordonis al siaj anoj.

„Ĉu vi do volas fituŝi min?“ Santer grandiĝumis, ekteniĝante, kvazaŭ li volis defendiĝi.

„Forprenu ilin!“ Pida ripetis.

Kiam Santer vidis, kiom da manoj etendiĝis kontraŭ li, li forĵetis la armilojn kaj deklaris:

„Jen ili estas! Jen vi havu ilin, sed ne por ĉiam! Mi plendos al Tangua.“

„Faru tion!“ Pida respondis per aŭdebla malestimo.

La du pafiloj estis donataj al li, kaj mi devis etendi ambaŭ miajn manojn, pro lasi ilin kunligi. Dum tio okazis, Santer venis pli proksime kaj deklaris:

„Do tenu la pafilojn pro la nomo de la diablo, sed ĉio alia, kio estas en liaj poŝoj, estas mia, speciale tio ĉi —!“

Dum tio li etendis la manon al la poŝo, en kiu mi estis metinta la lastan volon de Winnetou.

„Reen!“ mi vokis al li.

Santer ektimigite cedis reen per mia laŭteco, sed rapide reregigiĝis, kaj moke rikanis al mi.

„*Hang it all*, kia riskemo de tiu ulo! Li estas kaptita kaj scias, ke lia lasta horo estas venonta, kaj tamen kriaĉas al mi kiel al ĉenita hundo! Sed tio ne helpas al Vi. Mi volas scii, kion Vi tie estis elteriginta kaj leginta.“

„Provu teni ĝin for de mi!“

„Tion mi kompreneble faros. Mi ja tute komprenas, ke vere devas ofendi Vin, kiam mi ricevas tiun trezoron en mian manon, sed Vi devos akcepti tion.“

Li repaŝis proksime kaj etendis ambaŭ manojn al mi. Ankoraŭ mi ne estis finiĝinte katenita, la rimeno estis nodita nur ĉirkaŭ unu manartiko, kaj nun devis esti ligota ĉirkaŭ la alia. Per forta eko mi liberigis miajn manojn, ekprenis Santer:on je la brusto per la maldekstra mano, kaj bategis la dekstran pugnon sur la kapon, ke li kolapsis kaj restis senmove kuŝante kiel ŝtupo.

„*Uf, uf, uf!*“ la ruĝuloj vokis ĉie ĉirkaŭe.

„Nun, refiksligu min!“ mi postulis al la kajovajoj, etendante la manojn al ili.

„Old Shatterhand havas sian nomon kun rajto“, Pida laŭdis min. „Kion volas tiu Santer de vi?“

„Parolantan paperon“, mi respondis. Kio ĝi fakte estis, mi ne rajtis diri.

„Santer parolis pri trezoro!“

„*Pshaw!* Li mem ne jam scias, kio estis skribita sur la paperon. Kies kaptito mi entute nun estas, ĉu via aŭ lia?“

„Vi estas mia.“

„Kial Vi tiukaze toleras, ke Santer fituŝas min pro elrabi min?“

„La ruĝaj militistoj volas havi nur viajn armilojn. Ĉion alian ili ne bezonas.“

„Ĉu tio estas kaŭzo doni ĝin al tiu homo? Ĉu kaptito de Pida estas tiel sen sekuro, ke ajn ĉiu fiulaĉo rajtas malplenigi liajn poŝojn? Mi donis min al vi, kaj honorigis vin per tio kiel militiston kaj ĉefon. Ĉu vi nun volas forgesi, ke mi estas viro, de kiu tiu Santer nur povas ricevi piedbatojn?“

La indiano estimas kuraĝon kaj fieron eĉ de lia plej ega malamiko. Mi ne estis konata inter la ruĝuloj esti malkuraĝulo, kaj tiutempe estis indolge traktinta Pida:n, kiam mi forkaptis lin el lia vizaĝo, pro savi Sam Hawkens:on. Pri tio mi konfidiĝis, kaj tuj montriĝis, ke mi ne estis erarinta pri Pida. Lia vido glitis de supre malsupren laŭ mi, tute ne malamikece.

„Old Shatterhand estas la plej brava inter ĉiuj blankaj ĉasistoj. Sed tiu, kiun vi batis teren, havas du langojn, el kiuj ĉiu parolas alimaniere, kaj du vizaĝojn, kiuj aspektas foje tiel kaj foje alie; li ne havos la permeson meti la manon en vian poŝojn.“

„Mi dankas al vi. Vi valoras esti ĉefo, kaj vi iam poste apartenos al la plej famaj viroj de la kajovajoj. Nobla militisto mortigas la malamikon, sed li ne humiligas lin.“

Mi vidis, kiel tiuj vortoj fierigis lin, kaj preskaŭ sonis bedaŭre, kiam li diris:

„Jes, li mortigas la malamikon. Old Shatterhand devos ekmorti, kaj ne nur ekmorti, sed li estos senkompatate torturata.“

„Torturu mian kaj mortigu min, vi aŭdos neniun plendon el mia buŝo! Sed fortenu tiun ulon de mi!“

Kiam miaj manoj estis kunligitaj, mi devis kuŝiĝi sur la tero, post kio oni ankaŭ metis katenojn ĉirkaŭ miaj piedartikoj. Intertempe Santer revekiĝis el sia senkonscio. Li starigis, venis al mi, batis min per la piedo kaj kriis dum tio:

„Vi batis min, hundo! Tion vi rekompencu! Mi sufokos vin!“

Li surgenuiĝis pro ekpreni mian kolon per ambaŭ manoj.

„Ĉesu, ne tuŝu lin!“ Pida vokis al li. „Mi malpermesas tion al vi!“

„Vi ne rajtas malpermesi ion al mi! Tiu fiulo estas mia ĝismorta malamiko, kaj li aŭdacis bati min. Pro tio li nun spertu, kiel —“

Santer ne povis finiĝi tiun frazon, ĉar subite mi tiris la genuojn al la korpo, kaj donis al li, kiu ne estis ekspektinta tian atakon, tiel fortan baton per la piedoj, ke li estis longadistance forpuŝata, kaj falegis per la dorso reen sur la teron. Nun li kriegis per kolero kiel sovaĝa besto. Li volis rapide stariĝi salte pro denove ekataki min, sed ne sukcesis tion. Liaj membroj doloris. Santer kapablis stariĝi nur malrapide, sed ankoraŭ ne rezignis pri la tuja venĝo, sed elzonigis sian revolveron, direktigis ĝin al mi kaj kriis:

„Via lasta horo alvenis, vi fiulo! Iru al la infero, al kiu vi apartenas!“

Indiano, kiu staris flanke de li, ekprenis lian manon. Tial, kiam li tamen lanĉis, la kuglo ne trafis.

„Kial vi malhelpas al mi?“ Santer koleris al la ruĝulo. „Mi rajtas fari kion mi volas, kaj tiu fiulo, kiu unue manbatis kaj poste piedbatis min, ekmortu!“

„Ne, vi ne rajtas fari kion vi volas“, Pida deklaris, alpaŝante kaj minace metante la manon sur la brakon de Santer. „Old Shatterhand estas mia, kaj neniuj rajtas tuŝi lin. Lia vivo estas mia posedaĵo, kaj neniuj aliaj rajtas ĝin forpreni de li.“

„Sed mi vengĝu kontraŭ li, mi, sub kies forto li estis jam delonge“, Santer insistis.

„Tio ne estas la afero de Pida. Vi faris kelkajn servojn al mia patro, la plej alta ĉefo, pro kio estas permesita al vi foje esti ĉe ni. Sed tio jam estas ĉio. Ne aŭdacu tro multe! Mi diras al vi: Se vi fituŝas Old Shatterhand:on, vi ekmortos per mia propra mano!“

„Kio do fakte okazu al li?“ Santer demandis timetigite.

„Pri tio ni interkonsilos.“

„Kio nu estas interkonsilenda? Ja tute klaras, kion vi devas fari!“

„Kio?“

„Mortigi lin.“

„Tio ja okazos.“

„Sed kiam? Vi venis tien ĉi pro festi la morton de Winnetou, via plej ega malamiko. Kiel vi povas fari tion pli bone ol tiel, ke vi torturadas ĵus je tiu ĉi loko Old Shatterhand:on, kiu estis lia plej bona amiko.“

„Tion ni ne rajtas.“

„Kial ne?“

„Ĉar ni transportu lin en nian vilaĝon.“

„En vian vilaĝon, ĉu? Pro kio?“

„Pro doni lin al Tangua, mia patro. Old Shatterhand iam dispafis ambaŭ liajn genuojn, kaj tial li estas lia. Tangua difinu, per kiu maniero li ekmortu.“

„Sensencaĵo! Unue transporti lin en vian vilaĝon! Estas stultaĵo, kia pli granda ne povas ekzisti!“

„Silentu! Pida, la juna ĉefo de la kajovajoj ne faras stultaĵojn!“

„Tamen estas stultaĵo! Ĉu vi do ne aŭdis, kiel ofte tiu Old Shatterhand jam estis kaptita? Kaj ĉiam denove li sukcesis per sia ruzeco refuĝi. Se vi ne mortigas lin ĵus tuj, sed unue longe transportadas lin kun vi, li baldaŭ estos remalaperinta.“

„Li ne povos fuĝi de ni. Ni traktos lin, kiel tia pruviginta militisto estu traktata, sed tamen estos tiel gardiĝe dum tio, ke la fuĝo neeblos al li.“

„*Hang it all!* Eĉ trakti lin kiel faman viron! Ĉu vi eĉ volas ornami lin per florgirlandoj kaj pendigi ordenojn de lia brusto?“

„Pida ne scias, kio estas ordenoj, sed li klare scias, ke oni devas trakti Old Shatterhand:on alimaniere, kiel ni traktus vin, se vi estus nia kaptito.“

„Bone, bone! Mi nun scias, kion mi pensu. Mi ankaŭ havas rajtojn pri li, eĉ eminentajn rajtojn. Pro vi mi volis rezigni pri ili, lia vivo devis esti via. Sed nun mi pensas alie. Li apartenas al mi same kiel al vi, kaj se vi pensas, ke vi traktu lin kiel faman viron, mi almenaŭ prizorgos, ke li ne fartos sufiĉe bone. Li povas trompi vin, de vi li sukcesos fuĝi. Sed mi gardados, ke li vere ricevos la rekompencan, kiun li ŝuldas al mi. Se vi transportos lin en vian vilaĝon, mi kunrajdos.“

„Pida ne povas malpermesi al vi kuniri kun ni, sed li ripetas sian parolon: Se vi nur tuŝacas lin, vi ekmortigōs per la propra mano de Pida! Kaj nun ni interkonsilu, kio okazu.“

„Tio ne interkonsilendas, mi povas diri tion al vi ĵus nun.“

„La voĉo de Santer ne estas bezonata. Li ne apartenas al la konsiladuloj de niaj viroj.“

Pida deturniĝis kaj elektis la plej maljunajn inter siaj militistoj. Kun ili li sidiĝis iom pli for pro interkonsilado. La aliaj sidiĝis ĉie ĉirkaŭ mi, kaj flustre interparolis tiel mallaŭte, ke mi ne povis kompreni ion. Ĉiukaze ili certe ege ĝojis kaj same fieris, ke ili kaptis Old Shatterhand:on. Torturadi min ĝismorte, tio estis granda honorigo al ili, kaj kaŭzis famon, pri kiu certe ĉiu alia tribo estus enviinta ilin.

Mi agis, kvazaŭ mi tute ne atentigis pri ili, sed kaŝe esploris ĉiun unuopan vizaĝon, kaj tion, kio esprimiĝis sur ĝi. Tio ne estis senpardona, pasia kaj senindulga malamikeco. Tiutempe, kiam mi ne jam posedis famon de okcidentulo, kaj lezis ilian ĉefon tiel ege, jes, kripligis lin per unu pafo, tiutempe ilia kolero kontraŭ mi estis senfine. Sed ekde tio pasiĝis jaroj, kaj la altgrada kolero kontraŭ mi estis trankviliginta. Mi estis estiĝinta fama okcidentulo, kaj ofte pruvinta, ke ruĝa viro havis la saman altan valoron por mi kiel blanka. Maksimume estis Tangua, la ĉefo, kiu ankoraŭ malamamis min tiel arde kiel antaŭe, tute komprenebla konsekvenco de lia kripleco, kiun mi estis kaŭzinta. Ĉar ke li fakte kulpis pri tio mem, tion li certe ne konfesis.

Ke mi tiutempe estis kaptinta Pida:n, kaj traktinta lin malgraŭ nia malamikeco tiel indulge, devis nun kuŝi en la pesiltaso pro mi. Nun mi estis al la kajovajoj certe plie la multe prirakontata Old Shatterhand, malplie la blankulo, kiun ilia ĉefo estis deviginta pafi en liajn krurojn. Tion mi eksciis per la vidoj, kiujn ili direktigis al mi, kaj kiujn mi volas priskribi preskaŭ esti estime. Sed tio ne devis delogi min ekhavi iaĵn esperojn pri mia nuna situacio. Ili povis estimi min ajn kiel ili volis, sed nur tial mi ne povis ekspekti kompaton de ili. Jes, alian ulon ili eble estus reellasintaj, sed ne min, mi, kies kaptiteco kaj morto devis certigi al ili la envion de ĉiuj aliaj ruĝaj triboj. Laŭ iliaj opinioj mi estis certe dediĉata al la neevitebla ekmorto sur la tortura fosto, kaj kiel blankulo sidas en teatrejo kun plej alta spektemo, kiam la verko de eminenta poeto aŭ komponisto estas enscenigata la unuan fojon, same avide ili estis jam nun vidi, kiel Old Shatterhand kondutos dum la doloregoj, kiujn li devis atendi.

Kvankam mi diris tion al mi, mi sentis eĉ ne la plej etan timon, eĉ ne zorgon pri mi. El kiaj aliaj danĝeroj mi jam feliĉe estis eliĝinta! Mi antaŭ nun tute ne fartis, kvazaŭ mi devis rezigni pri mia vivo. La homo esperu ĝis sia plej lasta momento, sed certe ankaŭ faru ajn ĉion per propra forto, ke tiu espero plenumiĝu. Ajn kio ne faras tion, certe pereos.

Santer estis sidiĝinta al miaj ĝisnunaj tri kunuloj, kaj parolis mallaŭte kaj decideme al ili. Mi antaŭsentis, kio estis la temo de lia parolado. Ankaŭ ili estis aŭdintaj pri Old Shatterhand, ili sciis, ke tiu viro ne estis fiulo, ne krimulo, kaj tial la kondutado de Santer certe ne estis farinta bonan impreson al ili. Certe ankaŭ kromiĝis la internaj riproĉoj, kiujn ili faris al ili mem. Per lia igo ili mensogis al mi, forsilentis, ke la indianoj estis en la proksimo. Do fakte estis nur ilia kulpo, ke mi estis kaptita, kaj tiu supozinde maltrankviligis ilin, ĉar ili ne estis malbonanimaj homoj. Nun Santer klopodis ŝajnigi la aferon al ili tiel, ke ili ne bezonis riproĉi al ili mem.

La interkonsildado de la kajovajoj ne daŭris longe. La ruĝuloj, kiuj estis partoprenintaj leviĝis de iliaj sidlokoj, kaj Pida deklaris al siaj anoj:

„La militistoj de la kajovajoj ne restos tie ĉi, sed ekrajdos al ilia vilaĝo, ĵus kiam ili estos manĝintaj. Ili pretiĝu baldaŭ foriri de tie ĉi!“

Mi estis ekspektinta ion kiel tiom, sed Santer ne. Li salte ekstarigis surprizigite, proksimiĝis al Pida kaj demandis:

„Vi volas foriri, ĉu? Sed ja estis konsentite, ke ni restus kelkajn tagojn tie ĉi!“

„Ofte io estas decidita, kio poste okazigos alie“, la ĉefo koncize respondis.

„Vi volis festi la morton de Winnteou!“

„Tion ni ja faros, sed ne jam hodiaŭ.“

„Sed kiam?“

„Tion ni ekscios de Tangua.“

„Sed kiujn kaŭzojn vi nu povas havi ŝanĝi vian opinion tiel subite?“

„Pida ne devas fari pravigajn raportojn al vi, sed li volas diri ĝin al vi, ĉar dum tio ankaŭ Old Shatterhand kunaŭskultos.“

Kaj plie turniĝite al mi ol al Santer, Pida pluis:

„Kiam ni venis tien ĉi pro ĝoji pri la morto de Winnetou, la ĉefo de la apaĉoj, ni ne jam sciis, ke lia amiko kaj frato Old Shatterhand iĝus sub nian forton. Tiu grava okazo realiĝis kaj duobligas nian ĝojon. Winnetou estis nia malamiko, sed tamen ruĝa viro. Old Shatterhand ankaŭ estas nia malamiko, kaj eĉ palvizaĝo. Lia ekmorto kaŭzu eĉ pli grandan ĝojon en niaj tendoj ol tiu de Winnetou, kaj la filoj kaj filinoj de la kajovajoj festos la finon de iliaj plej famaj malamikoj samtempe. Jen staras nur malgranda parto de niaj militistoj, kaj mi ne sufiĉe malĵunas pro decidi, kiel Old Shatterhand ekmortu. Pro tio la tuta tribo kunvenu, kaj Tangua, la plej eminenta kaj maljuna ĉefo, laŭtigu sian voĉon pro diri kio okazu. Tial ni ne restos tie ĉi, sed hastos veni hejmen, ĉar niaj fratoj kaj fratinoj ne povas aŭdi sufiĉe frue, kio okazis.“

„Sed ja ne estas pli taŭga loko torturadi Old Shatterhand: on ĝismorte ol tiu, je kiu ni nun troviĝas!“

„Tion Pida ankaŭ scias. Sed ĉu jam estas decidita, ke li ekmortu je alia loko? Ĉu ni ne povas poste reveni tien ĉi?“

„Tio ne eblas, ĉar Tangua, kiu ja certe volas ĉeesti tiam, ne povas rajdi.“

„Tiukaze li lasos sin porti tien ĉi per du ĉevaloj“, Pida klarigis. „Cetere li difinos, kion li volas, ĉiukaze Old Shatterhand estos enterigata tie ĉi.“

„Ankaŭ, se li ekmortu malsupre ĉe la Salt Fork, ĉu?“

„Ankaŭ tiukaze.“

„Li tiam estu transportota tien ĉi kiel mortulo, ĉu?“

„Jes.“

„De kiu?“

„De mi.“

„Nekompreneble! Kiun kaŭzon povas havi prudenta ruĝa militisto, peniĝi tiel pri la kadavro de morta blanka hundo!“

„Mi volas diri ĝin al vi, pro ke vi koniĝas pli bone pri Pida, la juna ĉefo de la

kajovajoj, kaj pro ke Old Shatterhand ekscias, kiel mi dankas al li, ke li tiutempe ne mortigis min, sed interŝanĝis min pro palvizaĝo.“

Kaj denove turniĝante plie al mi ol al Santer, li deklaris:

„Old Shatterhand ja estas nia malamiko, sed nobla militisto. Li iam estis povinta mortpafi Tangua:n malsupre ĉe la Rio Pecos, tamen ne faris tion, sed nur lamigis lin. Kaj tiel li ĉiam agis. Ĉiuj ruĝaj viroj scias tion, kaj tial estimu lin. Lia morto estas neeviteble, sed li ekmortu kiel eminenta heroo, pruvante, ke torturado, kian neniu homo antaŭe devis suferi, kapablos laŭtigi el li sonon de doloro. Kaj poste, kiam li estos morta, lia korpo ne estu formangata de la fiŝoj en la rivero aŭ disŝirata de la lupoj kaj vulturoj sur la prerio. Pruviĝinta ĉeĥo, kia li estas, devas havi tombon pro nia propra honoro, ni, kiu venkis lin. Kaj kie tiu tomba konstruaĵo staru? Pida aŭdis, ke Nŝo-tŝi, la bela filino de la apaĉoj, iam donacis sian animon al li. Tial lia korpo restu flanke de ŝia, pro ke lia menso povos unuiĝi en la Ĉiamaj Ĉasejoj kun ŝia. Tio estas la danko, kiu Pida ŝuldas al la kontraŭulo, kiu iam indulgiĝis pri lia vivo. Miaj ruĝaj fratoj aŭdis miajn vortojn. Ĉu ili konsentas pri mi?“

Demande li ĉirkaŭvidis al la ringo de siaj anoj.

„*Hongh, hongh, hongh!*“ eksonis konsente el ĉiuj buŝoj.

Verece, tiu juna kajovajo estis eksternorma, kaj, al liaj rilatoj, nobla homo! Ke li nun parolis tiel decidite pri mia torturada ekmorto, tio nun egalas al mi, sed ke tiu ekmorto devis esti tiel terure, do tiel glorige por mi, pro tio mi devis ŝuldi dankon al li, kaj ke li volis enterigi min flanke de Intŝu-tŝuna kaj Nŝo-tŝi, tio estis signo de delikatsento, kiun oni ĝenerale ne ekspektus de ruĝulo. Dum liaj militistoj aŭdigis ilian konsentan *hongh*:on, Santer laŭte ekridis kaj vokis al mi:

„Ulo, oni ja vere gratulu al Vi! Edziĝi en la Ĉiamaj Ĉasejoj al bela indianino; kiu povus havi la saman belan sorton! Mi preskaŭ volas, ke mi almenaŭ povus ĉeesti kiel gasto, nun ke mi nu ne estu la edziĝonto! Ĉu Vi ne volas inviti min?“

„Invito ne necesas“, mi trankvile deklaris, „ĉar Vi estos tie multe pli frue ol mi.“

„Ha, esti tie pli frue? Do Vi ne jam rezignas, ĉu? Bone, ke Vi diras tion tiel malkaŝe. Mi fikstenu Vin, fidu pri tio!“

Nun la indianoj ekiris pro grimpi malsupren en la valon, kie ili estis lasintaj iliajn ĉevalojn. Oni liberigis miajn piedojn, sed ligis min al du ruĝuloj, inter kiuj mi devis iri. Pida pendigis miajn du pafilojn de si. Santer sekvis kun la tri aliaj blankuloj, kiuj kondukis iliajn ĉevalojn, ĉar ni ja estis veniginta niajn ĉevalojn supren kun ni. La kondukilon de mia ĉevalo ekprenis kajovajo.

Malsupre oni une reresstadis. La *indsmen*:oj bruligis kelkajn fajrojn kaj rostis viandon, kiun ili estis kunhavintaj. Ili ankaŭ kunhavis sekigitan viandon en iliaj selpoŝoj. Mi ricevis bonan, kaj tiel grandan pecon, ke mi preskaŭ ne povis finmanĝi ĝin, sed tamen mi englutis ĝin, ĉar gravis al mi, ke mi tenis miajn fortojn. Oni devis, pro ke mi povis manĝi, liberigi miajn manojn, sed gardis min tiel bone dum tiu mallonga tempo, ke mi eĉ ne ekhavis la ideon fuĝi. Poste, kiam oni estis manĝinta, mi estis fiksligata sur ĉevalo, kaj la rajdado al la vilaĝo de la kajovajoj komencis.

Ekstere sur la ebenaĵo mi returniĝis sur la selo, pro fari adiaŭan vidon al la Nugget-

tsil. Ĉu mi iam estus revidonta la tombojn de Intŝu-tŝuna kaj lia filino? Esperinde! Fakte kiel libera viro!

La vojo de tie ĉi al la Salt Fork de la Red River ja estas konata al la leganto. Mi ne bezonas priskribi ĝin denove. Ankaŭ ne okaziĝis io menciinda survoje. La ruĝuloj gardadis min akre, kaj se ili ne estus farintaj tion, ja ĉiu fuĝoprovo de mi estus vanigita, ĉar Santer plenumigis sian promeson kaj prizorgis, ke mi eĉ ne havis la plej etan ŝancon pro tio. Li tute klopodis laŭeble malfaciligi la rajdadon al mi, fari malkomfortigojn al mi kaj ĉagrenigi min. Rilate al la ĉagrenigo, liaj klopodoj vanis, ĉar mi ne lasis min maltrankviligi per la mokaj paroladoj, kiujn li daŭre faris al mi. Mi montris al li ĉiaman egalanimecon kaj neniun fojon faris la komplezon al li honorigi lin per respondo. Kaj liaj aliaj klopodoj estis tuj malpermesataj de Pida, kiu ne toleris, ke mia situacio estis pli malbonigata ol senkondiĉe necese.

Gates, Clay kaj Summer estis atentitaj de la *indsman*:oj preskaŭ tute ne. Ili teniĝu al Santer. Mi ja rimarkis, ke ili ŝate foje estus parolinta kun mi, kio verŝajne ne estis malpermesita de Pida al ili, sed Santer ĉiam kapablis eviti tion. Kompreneble estis grave al li eviti, ke mi havis la ŝancon klarigi la aferon al ili. Cetere li tute ne traktis ilin kiel kamaradojn. Ili estis devintaj helpi al li dum la serĉo de la oro, kaj mi estis konvinkita, ke li tuj estus foriginta de ili, kiam ĝi estus trovita. En la plej malbona kazo li eĉ ne estus evitinta triopan murdon. Sed nun la situacio ŝanĝiĝis. Supozinde ili estis sciiginta lin, ke mi havis la opinion, ke Winnetou estis forportinta la *nugget*:ojn, kaj la folioj, kiujn li estis vidinta en miaj manoj, devis esti al li la pruvo pro tio, ke tiu opinio havis certan kaŭzon. Sed se la oro nun estis je alia loko, estis vane serĉi ĝin tie ĉi, kaj li ne plu bezonis helpantojn. Tial Gates, Clay kaj Summer nun estis ĝenaj tropezoj al li, kiujn li plej ŝate estis deskuinta. Sed kiel? Ĉu li simple povis forsendi ilin? Ne. Li devis kunpreni ilin, sed faris tion nur kun la intenco, liberiĝi de ili je la plej unua ŝanco.

Facile penseblas, ke la intencoj kaj aspiroj de Santer ekde nun celis nur al miaj paperoj, kiujn li pritaksis — ne vere malprave — esti indikaĵo pri la novo orkaŝejo de la apaĉo. Li havis la ardan deziron ricevi ilin en liajn manojn. Depreni ilin de mi malkaŝe, tion li ne povis aŭdaci pro Pida. Do restis nur du manieroj al li ricevi ilin: aŭ li devis ŝteli ilin de mi dum dormado, aŭ li atendis nian alvenon en la vilaĝo de la kajovajoj pro persvadi Tangua:n lasi ilin al li. Tute ne malfacilis al li atingi sian celon per iu el tiuj du rimedoj. La paperoj ankoraŭ troviĝis en mia poŝo. Kie mi povis kaŝi ilin? Ie en miaj vestaĵoj? Tio estus devinta okaziĝinti kaŝe, do, kiam mi iam estus estinta sole. Sed tiam mi ĉiam estis katenita. Kaj al la ĉefo li ja estis farinta servojn, pri kiuj Tangua devis esti dankema al li. Kiel facile do estis al Santer igi la ĉefon deprenigi la paperojn de mi, kaj doni ilin al li!

Tio kaŭzis kapdolorojn al mi. Mi ne afliktiĝis pri mi mem, pri mia persono aŭ mia vivo, sed des pli nur pri la heredaĵo de mia Winnetou.